

Bruno Hardt-Warden,

## Ĉe mia patra dom'

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĉe mia patra dom' tili' majestas,  
 ĉe mia patra dom' benk' sur dekliv'.  
 Kaj kiam tie mi reestas,  
 mi restos por la tuta viv'.  
 Ĝojigos min tili' susure  
 per ĝia foliara ĥor',  
 ĝin tiam mi aŭskultos nure,  
 nun revas nur pri ĝi la kor'.  
 Ĝin tiam mi aŭskultos nure,  
 sed kiam venos tiu hor'!

En tiu fremda, granda lok',  
 en tiu ŝtona mar',  
 apenaŭ flor' por mi allog'  
 dum tuta, tuta jar'.

Ĉe mia patra dom' tri rozoj floras,  
 kaj ilin zorge flegis la patrin'.  
 Nun en aŭtun' ne plu odoras  
 kaj certe velkis ĝis la fin'.  
 Sed venos mi, la rozoj estos  
 laŭ la sopir' de mia kor',  
 kaj sur genu' ĉe l'rozoj restos,  
 regvidos min infan-memor',  
 kaj sur genu' ĉe l'rozoj restos,  
 sed kiam venos tiu hor'!

...

Bruno Hardt-Warden,

## Vor meinem Vaterhaus

Vor meinem Vaterhaus steht eine Linde  
 Vor meinem Vaterhaus steht eine Bank  
 Und wenn ich einst sie wiederfinde  
 Dann bleib ich dort mein Leben lang  
 Dann wird die Linde wieder rauschen  
 Ihr liebes altes Heimatlied  
 Mein ganzes Herz wird ihr dann lauschen  
 Das oft in Träumen heimwärts zieht  
 Mein ganzes Herz wird ihr dann lauschen  
 Wer weiß, wer weiß wann das geschieht

In dieser fremden großen Stadt  
 In diesem Bild aus Stein  
 Da grüßt dich kaum ein Blütenblatt  
 Mit süß vertrautem Schein

Vor meinem Vaterhaus da stehn drei Rosen  
 Die gehegt, gepflegt mein Mütterlein  
 Doch jetzt zur Zeit der Herbstzeitlosen  
 Da werden sie verwelkt schon sein  
 Doch wenn ich komm dann blühen sie wieder  
 Wie sie mein Singen blühen sieht  
 Dann knie ich vor den Rosen nieder  
 Wo ich als Kind so gern gekniet  
 Dann knie ich vor den Rosen nieder  
 Wer weiß, wer weiß wann das geschieht

...

En tiu fremda, granda lok'  
apenaŭ estas put',  
murmuras lace en sufok'  
malgraŭ kolora lud'.

Ĉe mia patra dom' troviĝas puto,  
fluetas akvo ĝia en plaŭdad'.  
Knabinoj iras al la puto,  
rakontas tie pri l'amat'.  
Nur unu ne, ja ŝi sin bridos,  
al mi perdiĝis ŝia kor'.  
Hejmiĝos mi, ŝi ĝoje ridos,  
ĉagren', doloroj estos for.  
Hejmiĝos mi, ŝi ĝoje ridos,  
sed kiam estos tiu hor'!  
Ja, ja, sed kiam estos tiu hor'!

*Traduko de la Germana poemo "Vor meinem Vaterhaus" de Bruno Hardt-Warden en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Arg-943-1895 (2013-11-30 17:17:33)*

*Pri Joachim Giessner vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim\\_Giessner](http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner).*

In dieser fremden großen Stadt  
Sind stolze Brunnen viel  
Doch alle rauschen müd' und matt  
Trotz ihrem bunten Spiel

Vor meinem Vaterhaus da steht ein Brunnen  
Sein Wasser rinnt und rauscht so silberhell  
Die Mädchen gehn zu diesem Brunnen  
Erzählen sich vom Liebsten schnell  
Nur eine schweigt zu all den Sachen  
Die einst ihr Herz an mich verriet  
Doch kehrt ich heim dann wird sie lachen  
Und aller Schmerz und Kummer flieht  
Doch kehrt ich heim dann wird sie lachen  
Wer weiß, wer weiß wann das geschieht  
Jaja - wer weiß, wer weiß wann das geschieht

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Bruno Hardt-Warden.*

*Arg-943-1894 (2013-11-30 17:15:27)*

*La melodion verkis Robert Stolz. Pri tiu vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Robert\\_Stolz](http://de.wikipedia.org/wiki/Robert_Stolz) respektive [http://eo.wikipedia.org/wiki/Robert\\_Stolz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Robert_Stolz). La teksto, kiun verkis Bruno Hardt-Warden, troviĝas interalie en <http://www.nanamousskouri.de/vormeinv.htm> kaj en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/vormeine.html>. La melodion oni povas aŭdi en <http://www.youtube.com/watch?v=z07CiHu0C8s> kaj <http://www.youtube.com/watch?v=z07CiHu0C8s>.*